

Heinrich Heine,
 Vin kantflugile, kara
tradukita de Kálmán Kalocsay

Vin kantflugile, kara,
 mi portus de tie ĉi.
 Sur Ganges-bordo lokon
 belegan ja scias mi.

Ruĝflora ĝarden' tie kuŝas
 en lunlumita kviet',
 la lotusfloroj atendas
 je l' kora fratinet'.

Violoj ridetas, kisas,
 rigardas el stela ĉiel',
 fabelojn odorajn rozoj
 flustras al si ĉe orel'.

Spionas la piaj, saĝaj
 gazeloj, saltas kun baŭm',
 la sankta river' lontane
 susuras per sia ŝaŭm'.

Kaj tie ni por ripozo
 kuŝos sub alta palm',
 kaj trinkos amon, pacon
 kaj songos pri fea ĉarm'.

...

Heinrich Heine,
 Surflugiloj de la kanto
tradukita de Manfredo Ratislavo

Surflugiloj de la kanto
 Al Gango vi lasu vin
 Forporti de via amanto
 Al plej bela lok', karulin'.

Jen kuŝas en la lunbrilo
 Floranta lotus-ĝarden',
 Aperas en la trankvilo
 Sorĉigaj feinoj jen.

Karese la violetojn
 Subridi jen aŭdas vi,
 Rakontas odorajn sekretojn
 La rozoj inter si.

Gazeloj alsaltas maltime,
 Mallaŭte nur tra la aer'
 Aŭdigas de malproksime
 Susuro de l' sankta river'.

Ni volas ekkuŝi tie,
 En arbareto sub palm'
 Ripozu kaj am-ebrie
 Songadi en nokta kalm'.

...

Heinrich Heine,
 Auf Flügeln des Gesanges

Auf Flügeln des Gesanges,
 Herzliebchen, trag ich dich fort,
 Fort nach den Fluten des Ganges,
 Dort weiß ich den schönsten Ort.

Dort liegt ein rotblühender Garten
 Im stillen Mondenschein;
 Die Lotosblumen erwarten
 Ihr trautes Schwesterlein.

Die Veilchen kichern und kosen,
 Und schau'n nach den Sternen empor;
 Und heimlich erzählen die Rosen
 Sich duftende Märchen ins Ohr.

Es hüpfen herbei und lauschen
 Die frommen, klugen Gazellen;
 Und in der Ferne rauschen
 Des heiligen Stromes Welln.

Dort wollen wir niedersinken
 Unter dem Palmenbaum,
 Und Liebe und Ruhe trinken,
 Und träumen seligen Traum.

...

*Traduko de la Germana poemo “Auf Flügeln des Gesanges” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-540-1081 (2010-05-22 15:40:11)

*Traduko de la Germana poemo “Auf Flügeln des Gesanges” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)

El la „Libro de l’ Kantoj“, lirika intermezo.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-540-1079 (2012-03-09 09:52:29)

Aus dem Buch der Lieder, Lyrisches Intermezzo.